MONATA GAZETO DE E-HANDIKAPULOJ

INFORMILO

4

APRILO 2018 Kol. 396/34

xxxx

do reaŭdis kelkajn el la antaŭe lernitaj nocioj dum 90-minuta dormeto.

„Ni antaŭe montris al la testpersonoj 100 adjektivojn kiel "granda" aŭ "rapida" kaj krome bildon, kiu aŭ montris objekton, ekzemple pomon, aŭ scenon, ekzemple farmon. Post tio oni ekzamenis la asocian memoron de la partoprenantoj kaj oni testis, ĉu ili ankoraŭ memoras la koncernajn bildojn, se ili revidas la adjektivon. Ankoraŭ antaŭ la dormado plej multaj povis atribui averaĝe 80 el la 100 objektoj aŭ scenoj“, diras la psikologo.

Post la dormado pluaj nocioj perdiĝis el la memoro. Tamen tiuj, kiuj estis dormintaj kaj dume estis reaŭdintaj parton de la jam lernitaj nocioj, sciis averaĝe 15 nociojn pli ol tiuj, kiuj restis maldormaj. 15 procentoj ne sonas multe, sed se oni pensas pri lernejaj notoj, tio tamen povus esti diferenco inter noto 1 (tre bone) kaj noto 3 (kontentige).

La sekvan tagon la kontrasto estis ankoraŭ pli klara: „La grupo, kiu estis dorminta, forgesis nur kvin procentojn. La aliaj testatoj aliflanke forgesis ankoraŭ pliajn 20 procentojn.“ Precipe dum la dormado ankoraŭfoje aŭditaj nocioj estis signife pli bone fiksitaj en la memoro.

„Ni observas ĉi tie praktike du efikojn. Unu estas, ke dormado post la lernado helpas. Dum tiu dormeto okazas ankoraŭfoje kroma impeto pro la produktivo de la memoro, se ni akcentas kelkajn nervosignalojn per la reaktivigo de la memoro.“

Kaj tion oni vidas en la cerbo. Ĉar la esploristoj ne nur testis la memoran produktivon de la testpersonoj, sed rigardis ankaŭ en la cerbon. Ĉe tio montriĝas en la EEG (elektroencefalogramo), kiel la cerbo dum la fazo de profunda dormo aktiviĝas dum duona ĝis du sekundoj. Fakuloj parolas tie pri tiel nomataj cerbaj spindeloj. Ke tiuj aktivecoj rilatas al lernado, tion konjektigis jam pli fruaj studoj, kiuj ekzemple montris, ke pli da spindeloj aperas dum dormado, se oni tuj antaŭe estis lerninta multe.

La sciencistoj tiel trovis pruvon, ke la cerbaj spindeloj ludas ŝlosilan rolon en la firmigo de scio. „Kiam ni reludis la adjektivojn kiel "granda" aŭ "rapida" ankoraŭfoje, ni vidis, ke tuj poste aperis spindeloj.“ Eĉ pli: Helpe de la spindeloj la esploristoj ankaŭ ekkonis, kiu informo ĵus estis prilaborata - ĉu kun la nocio do estis kunligita objekto aŭ sceno kiel la farmo.

„Tio estis unu el la grandaj progresoj de nia studo. Ni tiel povis montri, ke spindeloj estas ne nur akompana fenomeno de la dormo. Ili klare staras en rekta kunligo kun la reprilaborado de lern-enhavoj.“ Tiuj partoprenantoj kun pli da spindeloj dum dormado nome pli bone memortenis la lernitaĵojn.

Ke dumdorma lernado funkcias ankaŭ kun vortoj de fremda lingvo aŭ kun alia lernaĵo, pri tio la esploristoj estas konvinkitaj. „Ankaŭ tie la cerbo provas asocii kaj enkuŝigi la novan scion en ion jam konatan kaj kunligi ĝin kun tio.“ Gravas tamen, ke la lernaĵo estu aŭdigata ne tro rapide kaj kun paŭzoj. Kaj krome la lernanto devas troviĝi en la fazo de profunda dormo, kiu estas

atingebla post proksimume 20 ĝis 30 minutoj. „Nuntempe tio sonas kvazaŭ muziko el la estonteco, sed ja estus penseble, ke ekzemple komputileca horloĝo, kiu mezuras la dormofazojn, povus esti programita tiel, ke ĝi aŭtomate dum la ĝusta momento aŭdigas la sondosieron.“

Anton Oberndorfer (el E-Retradio)

Grupo de E-mental

Ĉe la fino de februaro nia grupo, kiel ĉiujare, en la praga Zooĝardeno monsubtenis la adoptitajn bestojn kaj konkursis pri la plej bona unubuŝfrandaĵo. Venkis salaj buĥtetoj kun ŝodo (maldensa ovopudingo), sushi kaj dolĉaj karotaj darioloj.

Pluan tagon ni vizitis ekspozicion de la Etnografia muzeo (en la Kinských-Belvedero en Prago) „Tradicia popola kulturo tra palpado“.

Ni admiris belegajn naciajn kostumojn, ekspozicion de kamparo kaj ni rememoris la tempon de niaj pragepatroj. Tiu parto de la ekspozicio estas destinita por blindaj vizitantoj, kiuj povas propramane tuŝi karesmajn(*) figuretojn.

Poste ni mem povis provi ekkoni la objektojn nur per la palpado. Kaj kredu, ke tio tute ne estis simpla. Nur kelkaj el ni

ekperceptis preskaŭ ĉion. Kvankam ni ĉe tio multe ridis, tamen ni eksciis, kiel la vivo de nevidantaj homoj estas malfacila kaj ilia kuraĝo admirinda. Lenka Angelová

(*)karesmo = semajno antaŭ Pasko aŭ karnavalo.

Elkore ni invitas vin al

la 20-a Esperanto - tago

en Pardubice, la 2-an de junio 2018 de la 9:30 horo en la restoracio „Pod Kunětickou horou“.

El la programo:

aktualaĵoj de nia organizaĵo AEH kaj ankaŭ de la ceteraj kluboj de ĈEA, rakontado pri la pasinta UK en Seulo kaj pri la venonta UK en Lisbono, komuna kantado, historio de la burgo Monto de Kunětice, komuna tagmanĝo, vizito de Mielkukaj dometo kaj muzeo.

Trafiko:

De la ĉefstacidomo forveturos la urba buso numero16 je la 8:37 h. Nia membrino atendos vin antaŭ la stacidomo kaj veturos en la sama buso kun vi. Se vi ne havas taŭgan konekson, informu nin, ke ni povu prizorgi por vi la forveturon. Reen al la stacidomo forveturadas la urbaj busoj: je la 15:19 h., kaj je la 16:26 h. Ni ĝojatendas vin.

E-klubo de D-ro Schulhof kaj AEH en Pardubice
tel.: Mirka Kosnarová Lenka Angelová
721 537 970 tel.:775 323 903
aeh@esperanto-aeh.eu

Finkalkulo de AEH de la jaro 2017 + budĝeto por la jaro 2018

	budĝeto 2017	realo 2017	budĝeto 2018
Enspezoj			
interezoj el kuranta konto	10	4	10
dotoj, donacoj	20 000	19 700	20 000
membrokotizoj	30 000	35 580	30 000
seminarioj	110 000	114 120	0
ekskursoj	0	0	0
Sume	**160 010**	**169 404**	**50 010**
Elspezoj			
materialo	15 000	13 449	15 000
poŝto, telefono, intereto	26 000	25 905	26 000
riparoj, servoj	2 000	980	2 000
gazetoj, libroj	500	890	500
kunvenoj	5 000	2 000	3 000
impostoj	500	0	0
vojaĝelspezoj	5 000	2 627	1 000
banko	500	657	100
seminarioj	104 000	135 332	0
ekskursoj	0	0	0
dotoj, donacoj	500	530	500
Sume	**159 000**	**182 370**	**48 100**
Enspezoj - elspezoj	**1 010**	**-12 966**	**1 910**

Lenka Angelová
prezidantino de AEH

Ing. Stanislava Nováková
kontistino de AEH

Pluaj invitoj:

4. - 6. majo 2018 La tradicia Maja IKUE-renkontiĝo en Ĉeĥio. La aranĝo okazos en la belega Maria-pilgrimloko Svatý Hostýn – Sankta Hostýn en la landparto Moravio. E-renkontiĝo kun interesa programo. Aliĝilo kun informoj elŝutebla:
http://www.ikue.org/cz

70-a kongreso de IFEF

Plua invito estas por la tagoj 19. - 25. majo 2018 al la pola urbo Wroclaw, Pollando. Jarkongreso de IFEF kun fakaj kunsidoj kaj ekskursoj en la regiono. La organizantoj invitas ne nur fervojistojn – por riĉigi la komunumon kaj doni eblon viziti unu el la plej belaj urboj en Pollando. Prezentaĵo pri la urbo kaj kongreso atingeblas rete wlib24@o2.pl

Solenaĵo omaĝe al la dekjariĝo de la Esperanto-Muzeo

en la urbo Svitavy, Ĉeĥio, la 14. - 16. 9. 2018. La muzeo estos post la rekonstruo denove malfermita.

Ĉeĥa Fervojista E-Asocio

5 .- 7. oktobro 2018 La aŭtuna konferenco okazos en la tagoj 5-a ĝis la 7-a de oktobro 2018 en la hotelo OSŽ Ostrý en Železná Ruda en okcidenta Bohemio proksime de la ĉeĥa-germana landlimo, do ne en septembro, kiel estis planite. Bonvolu korekti la daton! www.ifef.wz.cz aŭ www.ifef.net

Printempa renkontiĝo de Ĉeĥa Esperanto-Junularo

5-a Centrejo en Žďár nad Sázavou, Ĉeĥio 27. 4. – 1. 5. 2018 . La ĉefa renkontiĝo de Ĉeĥa Esperanto-Junularo. Organizas: Ĉeĥa Esperanto-Junularo - retadreso: mladez@esperanto.cz, tel: +420605502231 http://centrejo.esperanto.cz/cs/

Trista anonco:



la 4-an de marto 2018 forpasis **MUDr. Vladimír Škoda** el Bučovice. Multaj esperantistoj certe lin memoras ekzemple el la Somera E-tendaro Lančov. Li naskiĝis en la jaro 1953 en Žďár nad Sázavou. Ni memoras lin, kiel li estis funkciulo de la Centra komitato de ĈEA, li estis ankaŭ konata kiel lektoro de skribaj kursoj. Li mortis dum dormo. Honoron al lia memoro.

red.

INFORMILO – monata gazeto por esperantistoj-handikapuloj + suplemento **ANTAŬEN**
Eldonas AEH – Asocio de esperantistoj-handikapuloj en Pardubice
Redaktoroj: Jarmila Rýznarová, Ludmila Srbová
Adreso: Svaz zdravotně postižených esperantistů, Na Okrouhlíku 953/21,
530 03 PARDUBICE, CZ tel. **466 611 941**
e-mail: **aeh@esperanto-aeh.eu** interreto: **www.esperanto-aeh.eu**
Banka kunligo: Fiobanko, kont-numero de AEH 2801322017, bank-kodo 2010
Bankovní spojení: Fio banka , číslo účtu AEH 2801322017, kód banky **2010**
IBAN: CZ3520100000002801322017 SWIFT/BIC: FIOBCZPPXXX
La jarabono de Informilo **20 €** (en kovertoj), aŭ 10 € (e-mail)
Roční předplatné Informila **300,-Kč** (v obálkách), nebo 150,-Kč (v e-mailu)
Při platbách vždy uveďte vaše členské číslo (naleznete nad vaší adresou) jako variabilní symbol! Příspěvek svazu AEH v dobrovolné výši.
Kotizo por AEH propravola. Kodo ĉe UEA: aehk-z
La redakcio ne ĉiam havas la saman opinion kiel la aŭtoroj de la artikoloj.